FN PER ANC 47

N°247 SEPTEMBRO 2011

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO



# ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.

## Trevor STEELE prelegos en HEROUVILLE la 19an DE OKTOBRO
## Pri sia sperto ĉe la ABORIGENOJ.

Kadre de prelegvojaĝo de Esperanto France en oktobro, Trevor vizitos 7 urbojn : Lille, Amiens, **Hérouville St Clair** (apud Caen 14), Le Mans, Périgueux, Bourges, Paris.

Aŭstraliano, li pasigis kvaronon de sia vivo en aliaj landoj por labori kiel lingvoinstruisto, socialhelpanto en Germanio, aŭ ĝenerala direktoro de UEA. Li restadis unu jaron kaj duono en Bona Espero en Brazilo. Li ankaŭ famas en Esperantujo kiel verkisto de 6 romanoj kaj 2 novelaroj kaj ankaŭ verkas en la angla. Nia normanda asocio parte subvencias lian turneon kaj ni plezure invitas vin partopreni lian restadon en Hérouville Saint Clair ("Calvados"), laŭ jena programo :

**la 18an de oktobro** : kluba vespermanĝo : 18h30 en Maison des associations, 10-18 bd Grand Parc, Hérouville.Saint Clair (14).

**la 19an de oktobro**, 18h30 : PUBLIKA PRELEGO PRI LIA LASTA VERKO : «FLUGI KUN KAKATUOJ », romano pri konfliktoj fine de la 19a jarcento inter blankuloj kaj aborigenoj kun kiuj Trevor Steele kelktempe vivis. En librovendejo apud kinejo « Café des Images ».

Pliaj informoj ĉe Yves NICOLAS : nicosibi@club-internet.fr Tel. 02 31 95 11 81.



*Sur la foto :*
*Trevor staras plej maldekstre.*

### En tiu numero :


| | |
|---|---|
| Kopenhago, UEA Kongreso. | 2 |
| Port Lyautey. | 3 |
| Maksimuma amo. | 3 |
| Mediteranea E° Semajno. | 3 |
| Milokampo en dezerto. | 4 |
| Pétition Espéranto au bac. | 4 |
| Nia bulteno tra jaroj (8). | 5 |
| Eŭropa Tago | 6 |

# UEA kongresis en Kopenhago.

Ventis, jes. Pluvis, ja. Sed sunis en la koroj dank'al la ne difektigebla entuziasmo de 1 400 kongresanoj, en la Universala Kongreso de Kopenhago. Ili venis de pli ol 60 landoj por krei unu nuran landon dum unu semajno : Esperantio.

Imagu : jen homoj kiuj tutjare sentas sin ne komprenataj, aù rigardataj kiel duonfrenezuloj, sektanoj, utopiistoj. Unuopaj aù kelkopaj en sia urbo aù vilaĝo por flegi la internacian lingvon, ili subite aliras komunan rendevuon en la mondo por pruvi al si, ke la lingvo de Zamenhof viglas plu, por ĝissate uzi ĝin kaj arigi sufiĉe da energio por la venonta jaro.

Kiel lastjare en Kubo kaj venontjare en Vjetnamio, esperanto fariĝis tre utila perilo en Kopenhago por viziti vidindaĵojn en Danlando, por spekti filmojn, por aùskulti prelegojn, por partopreni diskutojn kadre de tre ampleksa programo.

Mi ne forgesos la prelegojn de Tsi Sadan, israela lingvisto japane devena, pri la hebrea lingvo kaj tiun de Leif Nordenstorm, dana pastro pri « La vikingoj kaj la nova religio ». Mi ĝuis la koncerton de Kajto (Nederlando), kaj tiun de Ĵomart kaj Nataŝa (Svedio, antaùe Kazaĥio).

Ah ! via vizaĝo, Nataŝa... Mi spektis teatrigon de la romano de Mikaelo Bronŝtejn « Dek tagoj de kapitano Postnikov ». Mi bedaùrinde mistrafis la prezenton de la ĵus farita filmo de SAT pri la esperanta movado. Inter du programeroj, kiam mi ne babilis kun unu aù kun alia, mi vizitis remarkindan E-o librovendejon.

Dank'al Saŝa Kogan, ruso renkontita en Tiĥvin sed nun loĝanta en Danlando, mi estis bonŝanca partopreni ekskurson laù bela marbordo apud Kopenhago, kun 9 homoj (el Rusio, Danlando, Hungario, Svedio, Finnlando, Francio). Torben Svendsen kaj Mogens Rude Andersen, de la kopenhaga E-o societo, fariĝis lertaj ĉiceronoj en la domo de Karen Blixen (1885 – 1962, dana verkistino. Legu ŝian libron «La festeno de Babette », aù spektu la samtitolitan filmon kun Stephane Audran). Mogens ankaù instruis nin pri la dana astronomo Tycho Brahe (1546 – 1601) kaj pri la fama arkta esploristo Knud Rasmussen (1879 – 1933). Jes, dum amasa aranĝo kia estas UK, ankaù ofte kaj spontane stariĝas grupetoj kie la interindividuaj kontaktoj alte valoras

Oni plurfoje aludis pri Normandio ĉar historio forte ligas nin al la nordaj landoj, sed de nia regiono videble venis nur Odile Masseron (Hérouville) kaj mi. Ĉu la normandaňoj estos pli vojaĝemaj en 2012 kaj partoprenos la UKon en Hanojo, aù alian internacian renkontiĝon ? Ĝuu Esperantion, amikoj !

***Yves Nicolas***

(grupo de Hérouville Saint Clair).



*Unuarange, de maldekstre :*
Birthe **Lapenna** (Danio), Katalin **Kovats** (Hungario), Sasha **Kogan** (Danio/Rusio), Victor **Kandalinski** (Rusio), Sylvia **Häzmäläinen** (Finnlando).

*Duarange :*
*Yves Nicolas (Caen),*
Sylvain **Lelarge** (Francio), Torbens **Svendsen** (Danio), Mogens Rude **Andersen** (Danio), Kerstin **Rohdin** (Svedio).

## Kiel mi konatiĝis kun esperantisto en Port-Lyautey

En majo 1951 mi ekokupis mian novan postenon sur la franca aermara bazo de Port-Lyautey (nun Kenitra) en Maroko. Mi estis reprezentanto sur tiu bazo de la « Mission française de Liaison » kun la usonanoj, kiuj tie konstruis gravegajn novajn instalaĵojn. Mi loĝis sur la bazo, sed havis mian profesian poŝtokeston en la poŝtoficejo de la urbo kiu troviĝis je ĉirkaŭ 20 kmj fore.

En Port-Lyautey tiam ekzistis grava esperantista grupo pri kiu mi jam aludis en nia Normanda Bulteno n°208 de somero 2001. La tieaj samideanoj enbrakumis min kiam mi alvenis, kaj provizis geamikojn al la izolulo, kia mi estis en tiu nova restadejo.. Sed mi ankoraŭ ne estis havinta la okazon konatiĝi kun aktivega membro de la grupo, kiu estris la poŝt-oficejon de Port-Lyautey.

Iutage, mi estis en la urbo kaj volis viziti mian poŝtokeston, sed mi estis forgesinta ĝian ŝlosilon. Mi tamen eniris, hezitis peti ĉar estis dube ke iu deĵoranto de la giĉetoj akceptus transdoni kurieron de oficiala poŝtokesto al nekonata senŝlosila junulo. Sed la manesoj de Zamenhof vigilis : malantaŭ la giĉetoj, pordo malfermiĝis kaj franca viro eliris. Li pasis malantaŭ la oficistoj kaj mi tiuj rimarkis ke li surportis verdan stelon ĉe la butontruo de sia jako. Mi alparolis lin en esperanto trans la bariloj :

- « Eh ! Sinjoro, mi petas ! »

Li turnis la kapon al mi kaj alproksimiĝis sen unu vorto, sed kun demandaj okuloj; mi do daŭrigis en esperanto :

- « Mi volus preni la eventualan enhavon el mia poŝtokesto, sed forgesis ĝian ŝlosilon, ĉu vi bonvolus min ĝin transdoni ? »

- « Kiu estas la numero de tiu kesto ? » Li flegme demandis, kiel se la uzita lingvo estus tute ordinara.

Mi indikis la numeron kaj li iris en la porservistan parton de la ĉambro por la leterskatoloj. Li rapide revenis kun manpleno da poŝtaĵoj, kaj diris :

- « Mi ne scias ĉu mi devas vin transdoni tiun poŝtaĵon, ne estas tre regula afero, precipe temante pri tiu speco de leteroj. »

- « Mi vin komprenas kaj ne insistos, mi nur esperis ŝpari al mi 40 kilometrojn ire kaj revene ĝis la bazo por preni la ŝlosilon. »

- « Ne estos necese, jen via poŝtaĵo. Mi supozas ke vi estas la novalveninta esperantisto pri kiu mi aŭdis en la grupo ?... », kaj nia konversacio fariĝis malpli profesia.

Tiel mi konatiĝis kun Sro Benazech, fakdelegito de **U**niversala **E**speranto **A**socio en Port-Lyautey.

***Henri ROUSSEAU***

## MAKSIMUMA AMO

Se mi devus bildigi kiagrade grandegas
L'amo kiun por ci, mi en la koro sentas,
Mi metafore dirus ke estante montaro,
Ĝi estus minimume... la Kilimanĝaro !

Se ĝi estus rivero, ĝi la valon inundus
Kiel en Pakistano tro ofte faras Indus',
De homo konstruaĵo, impona kaj eterna.
Ĝi estus la rivalo de la murego ĉina !

Estante animalo, ĝi ja estus mamuto,
Sukcesinta revivi el siberia frosto !
Por cin ĉirkaŭpremi, ĝi estus anakondo
Kiu cin senmovigus cele amaskisado !

Sub la formo de birdo, kio estus ? Divenu ...
Ne regolo evidente, sed strutego aŭ nandu'!
Vento ? Ne estus zefireto ! Sed monstra uragano !
Arbo ? Ĝi estus sekojego, plurcentjara platano.

Komandante armeon, ne sata de duono,
Ĝi tuŝante la supron estus Napoleono.
Politika fakulo, kapo plena je trukoj,
Makiavelo, Talleyrand, estus ĝiaj lernantoj.

**Sed por ci obeema, humila malfortulo,**
**Ĝi lanon fadenigus, herkulo por Omfalo.**

***Henri ROUSSEAU***

### Mediteranea Esperanto-Semajno 2012 :

25a de februaro ĝis la 3a de marto 2012.

Résidence Val d'Esquière - Les Issambres Francio. Lazura Marbordo.

Informoj kaj aliĝiloj :

Christine Graissaguel, les Iles d'Or, rue du progrès. 83600 Fréjus. Tel. 04.94.95.66.18.

## *MILIOKAMPO en DEZERTO*

En 1965 la Urbo Port-Etienne (nun Nouadhibou = *le pays des chacals* !) en Maŭritanio, nombris eble nur 10 000 loĝantojn, kaj estis kunmetaĵo de pli malpli izolitaj paralelipipedaj blankaj domoj, dissemitaj inter sablodunoj. Laŭ centoj da kilometroj ĉirkaŭ la urbo, estis absoluta dezerto, nenia arbo aŭ herbeto, nur sablo, ŝtonoj, polvo kaj rokoj turmentitaj de preskaŭ senĉesa vento. Okazis risko de pluvo unufoje jare, kaj dum mia trijara restado, nur dufoje pluvis dum malpli ol duonhoro.

Mi priskribis tiun klimaton por substreki unuflanke ke kompreneble en la regiono ekzistis nek agrikulturo, nek brutarbredado, kaj aliaflanke, la strangecon de kio sekvas.

Mi laboris pri la aerodromaj instalaĵoj kiuj inkluzivis kontraŭincendian stacion kun dekkvino da maŭritaniaj fajrosoldatoj.

La 20-an de novembro 1965, unu el tiuj fajrosoldatoj, Moud, venis al mi kaj diris :

- « Ĉu vi povus min pruntedoni porservan kamioneton, ĉar mi devas iri al mia miliokampo kaj eventuale ĝin rikolti. »

Tre surprizita de la peto, mi iom pli informiĝis, kaj lernis ke Moud naskiĝis en norda Maŭritanio de Maroko. Li ankaŭ estis vojaĝinta al suda Maŭritanio, ĝis la bordoj de la riverego Senegalo, kie li estis vidinta sorgokampojn; krome kiel ĉiuj « *bidanoj* » (loka vorto kiu nomas la blankajn indiĝenojn, de la araba « *byed* » = blanka), li ŝategis tramarŝi sola laŭ dekoj da kilometroj en la dezerto, revadi en la silento.

Li min diris ke iutage tiel promenante sola piede je ĉirkaŭ 35 kmj norde de Port-Etienne, en la hispana teritorio Rio de Oro, li rimarkis etan zonon iom pli malaltan ol la ĉirkaŭaĵo, iom pli malsekan, kun iom da tero kaj maldensa verdaĵo. Li tuj ekpensis ke milio, tre malmulte postulema pri akvo, tie kreskus. Reveninte en Port-Etienne li do aĉetis saketon da milio, kaj en la taŭga momento reiris al sia malgranda « *sebkha* » (ŝoto) kaj plantis siajn grenojn.

Kiam li min petis kamioneton, li ankoraŭ ne estis reirinta al sia kampo, kaj tute ne sciis ĉu io estis krestinta; se tiel estis, tempis rikolti.

Mi ne rajtis lin pruntedoni porservan kamioneton, nek tion volis pro timo ke li ĝin damaĝu dum privata ĉiuterena ekspedicio en fremda teritorio kie « *la Bandera* » (la hispana armeo) de la ...

... « *La Güera* » (hispana urbeto en Rio de Oro, je dek kilometroj de Port-Etienne) ja povis fari patrolojn. Tamen, ĉar mi estis ege interesita pri tiu eksterrutina afero, mi decidis mem iri, kondukante mian personan veturilon , *2 CV Citroën* kamioneton. Malgraŭ la ŝarĝo, kolego de Moud nin akompanus. Se bezone, mi farus plurajn vojaĝojn.


Unua miraklo, mia *bidano* sen kia ajn malfacilaĵo retrovis sian kampon malgraŭ nepra foresto de kiu ajn padeto, rimarkebla arbeto, monteto aŭ homa signilo. Fine ni atingis iom verdan zonon de ĉirkaŭ duonkvadrata kilometro; kompreneble ne estis Normandio, sed estis kelkaj tre dissemitaj arbetoj kaj herboj. En la centra parto, dua miraklo, efektive troviĝis eble duhektara miliokampo. La plantoj estis magraj kaj maldensaj, sed ili estis kreskintaj ! La du fajrosoldatoj rapide rikoltis la spikojn_kiuj sume pezis ĉirkaŭ 200 Kgjn dum mi fotis diapozitivojn, esploris la ĉirkaŭaĵon, kaj serĉis silikajn sagopintojn. Ununura vojaĝo sufiĉis por ĉion alvenigi al Port-Etienne; mi devis konduki mian iom ŝarĝitan « *dodoŝ* » kun aparta singardemo inter dunoj, ŝtonoj kaj rokoj.

Nur hodiaŭ **N**ormanda **E**speranto **B**ulteno rivelas al la hispanoj, kiuj ĝis nun ignoris, ke ilia kolonio en 1965 estis produktinta milion, kaj ke franco estis kontribuinta je ĝia eksportado al apuda lando.

***Henri ROUSSEAU***


## PÉTITION pour l' espéranto au baccalauréat

***Signez et faites signer la pétition***




**Campagne espéranto au bac,**
17 rue rue du Cambeihou
64400 Olron Sainte-Marie.
www.
**ESPERANTO-AU-BAC.FR**

Au **09 septembre** plus de **10.000** personnes avaient signé la pétition.
La collecte se poursuit jusqu'au 30 septembre **2012.**

| Bulteno | | |
|---|---|---|
| n° **126**a oktobro 1977 | 8 paĝa | Estrara kunsido UNE 24/9/1977 en Yvetot. 4a decembro : Zamenhofa Tago en MJC Les Andelys + estrara kunsido. Gesoj Gibaux en Southampton por la 60a jubileo de Sudangla E°Asocio. E°kurso en Vire de Sro L egret. 13 kursanoj en Caen. |
| n° **127**a decembro 1977 | 10 paĝa | Leteroj el Tamanrasset kaj Dakaro de ekslernanto de Sro Chalm. Radioelsendoj. Jarfesto en Le Havre : 35 personoj. 12 Southampton-anoj vizitis Le Havre. Yvetot : 45 personoj ĉeestas la bankedon de la 10a datreveno de la fondiĝo de la grupo. |
| n° **128**a marto 1978 | 8 paĝa | 5a de marto :Printempa renkontiĝo Le Havre : 53 partoprenantoj. Lingva angulo. Letero el Port of Spain, Trinidado. |
| n° **129**a junio 1978 | 8 paĝa | Ĝenerala kunveno en junulgastejo de Rouen. « Kalva kantistino » ludita de Teatro E°Parizo. Letero el Salvadoro. Gesinjoroj Pottie r, Lemarchand, Guerre, Gibaux zorgas pri la bulteno. 280 ekzempleroj de la bulteno eldonitaj. 186 normandaj adresoj. |
| n° **130**a oktobro 1978 | 10 paĝa | Estrara kunsido Grand Quevilly. Letero el Bona Espero Brazilo. Grupa vivo en Vire, Yvetot, Fécamp, Le Havre. Artikolo de Sro Guerre : Versajlo kastelo. |
| n° **131**a printempo 1979 | 11 paĝa | Estrara kunsido en Yvetot 3/3/1979. Prezentado de la E°laborista grupo de Le Havre antaŭmilite, vizito + kursoj de Lydia Zamenhof Januaro 1936. Letrero el Bona Espero. Grupa vivo en Rouen, Yvetot, Caen, Le Havre. |
| n° **132**a somero 1979 | 6 paĝa | 19/20a majo 1979 Kongreso Normanda en Le Havre : 54 partoprenantoj. (27 Le Havre, 27 el ekstere). Grupoj en Lisieux, Trouville, Caen, Pont Audemer, Vire, Rouen, Yvetot, Le Havre. Artikolo de Sro Guerre : Versajlo kastelo. |
| n° **133**a aŭtuno 1979 | 6 paĝa | Komitatkunveno en Caen 13/10/1979. Grupoj en Grand Quevilly, Rouen, Caen, Le Havre, Yvetot, Vire. Artikolo de sro Rousseau pri aerodromo + teknika terminaro. |
| n° **134**a vintro 1979 | 7 paĝa | Radioelsendoj. Grupoj en Caen, Yvetot, Les Andelys, Gd Quevilly, Rouen. Le Havre. |
| n° **135**a printempo 1980 | 6 paĝa | 2 paĝa « Proposition de loi ». Kongreso en Asnelles (14) 23/04/1980. 40 personoj |
| n° **136**a somero 1980 | 4 paĝa | Nova redaktoro : Sro Gibaux. Estrarkunveno Yvetot 27/8/1980. Estraranoj : Sroj Quillaud, Pottier, Loisel, Gibaux, Delaunay, Jouis, Lemarchand. |
| n° **137**a aŭtuno 1980 | 6 paĝa | Kunveno de naturamikoj el Rouen + Parizo 25/26 oktobro en junulgastejo de Mantes. |
| n° **138**a vintro 1980 | 6 paĝa | Grupoj en Les Andelys, Le Havre, Rouen, Yvetot, Lisieux, Domfront, Caen. |
| n° **139**a printempo 1981 | 6 paĝa | La Blanka abatejo el Mortain, venonta loko de la jara kongreso. |
| n° **140**a somero 1981 | 6 paĝa | Kongreso en Mortain : 24 personoj. Naturamika seminario en Vaucottes (76) : 35 personoj partoprenas. Sro Gibaux redaktas la bultenon, presado + dissendado : Loisel + Lemarchand. |
| n° **141**a aŭtuno 1981 | 8 paĝa | Ĝenerala kunveno de Francaj E°Fervojistoj en Collevi lle sur Mer : 130 partoprenantoj - 20 eksterlandanoj. |
| n° **142**a vintro 1981 | 6 + 2 paĝa | Komitata kunveno en Lisieux, Foriro de gesinjoroj Loisel sudfrancien. 2 paĝa suplemento de agadplano de UFE. |
| n° **143/144**a printempo / somero 1981 | 11 + 2 paĝa | 2 paĝa suplemento : « Premiers rendez-vous avec langue internationale » (UFE) Renkontiĝo de 2 angloj kun la tiama grupo de Le Havre en 1902. Radioelsendoj. La naturamika E°movado. Kongreso en Orléans de UFE. Ĝenerala kunveno en Etretat. Artikolo « kiuj estis la antaŭulinoj de niaj monaĥinoj , » de Sino Boniol. |
| N° **145/146**a aŭtuno / vintro 1981 | 14 paĝa | 3 gejunuloj en la estraro : Finoj Caron kaj Domingo, sro Michel. Redaktas Sro Gibaux, ekspedas Lemarchand. Ĝenerala kunveno en Etretat. 113 pagis asocian kotizon. 213 bultenoj senditaj al normandaj adresoj, 13 francien, 7 eksterlanden, 31 al E°organizaĵoj. Listo de « ŝlosilaj personoj ». Inter ili : Gesinjoroj : Angenault, Delaunay, Gibaux, Guerre, Huet, Jouis, Legret, Legros, Martin, Mary, Montagné, Peltier, Permanne, Rault, Véron.... Sekvo de la artikolo : » la antaŭulinoj de niaj monaĥinoj ». Grupoj en Le Havre, Caen, Lisieux, Domfront, Yvetot, Trouville, Hérouville Saint Clair, Rouen, Grand Quevilly. |

Daŭrigota...

## ESPERANTO - NORMANDIE

***Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures***

# Listo de kotizintoj por 2011

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba listo : Jam pagis por 2011, ge-Sinjoroj :

BADMINGTON, *BATAILLE A.*, BESSIERE, *CARON*, CHALM, *COLBERT*, COLOMBEL, *DEFRANCE*, DUBOIS, *DUBUC*, DUFEU, *DUFOSSE*, DUFRESNE, *DUVAL*, EL BAHRI, *EVRARD*, FRESLON, *GASCOIN*, GIBERT, *GROULT*, GUEROULT, *GUILMOT*, HELBERT, *HUBERT*, JOURDAINE, *JOUVIN*, LANGEOIS, *LARDEUR*, LEBRETON, *LECOUVREUR*, LEMARCHAND, *LEMELTIER*, LEONARD, *LEPERD*, LEPREVOST, *LESUEUR*, LEVESQUE, *LOISEL*, LONGUET, *MAGEREL*, MARIE, *MASSERON*, MAURAU, *MICHAUD*, MILLET, *MULOT*, NARDIN, *NICOLAS*, PAUMIER, *QUILLAUD*, RAUCH, *ROBIOLLE*, ROLLAND, *ROUSSEAU H.*, ROUSSEAU J., *SCHERTZER*, SENECAL, *SERY*, TAILPIED, *THIERRY*, ZILLIOX.


Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN Abon-kotizo por 2011 : 8 Eŭroj**, kaj sendu ĝin al la kasisto. Antaŭdankon !

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.

---

Ni informas vin pri la forpaso la 16an de julio 2011 en Saint Laurent de Brévedent, de Sinjoro **Daniel BÉCUE**, 87 jaraĝa, katolika pastro de Saint Maurice d' Ételan (76). Li estis tre agema kaj verkis artikolojn por nia asocia bulteneto.

Ni sincere kondolencas al la familianoj.




## 26a de septembro - Eŭropa Tago de Lingvoj jam 10an fojon

La 26a de septembro jam de 10-jaroj estas dediĉita al la lingvoj. En tiu tago mem (aŭ ĉirkaŭ tiu dato) okazas centoj da eventoj dise en Eŭropo (kaj mondo) por celebri la lingvan riĉecon de nia planedo kaj por atentigi pri la graveco de lingvolernado.

La eventoj estas diversaj: ludplenaj aktivaĵoj, ekspozicioj, modellecionoj, lingvaj enigmoj, konkursoj ktp. Ili okazas en lernejoj, institucioj, kadre de klubaj aŭ sociaj eventoj. la Konsilio de Eŭropo produktis glumarkojn en diversaj lingvoj. Ili estas publikigitaj en la paĝaro de la Konsilio de Eŭropo. http://edl.ecml.at/ En printempo 2010 Frank Huber kontaktis la responđeculojn kaj akiris por **edukado.net** la permeson krei la Esperanto-version de la glumarko kaj tiun disvastigi pere de la reta paĝaro de **edukado.net.**
**Katalin Kovats** nun provas atingi ke nian version ankaŭ la Konsilio de Eŭropo aldonu al sia kolekto.

## TRIA ESPERANTA SEMAJNFINO

**29-a (14h) ĝis la 31-a (17h) de oktobro 2011**
**Amicale Laïque**
**24, Bl Charner (en face de la gare SNCF)**
**22000 - SAINT BRIEUC**
***Unua grado : Guy MARTIN***
***Dua grado : André DEMARQUE el Belgio. Lia instruado temos pri Vincent Van Gogh.***
***Infanoj : Franjo LEVEQUE***

Tarifoj : Normala : 40 €,
Senlaborulo/studento : 20 €, Infanoj : senpaga.
Tranoktoj kaj matenmanĝoj ĉe la esperantistoj de la regiono. Manĝoj : 7,60 € /manĝo
Sendu vian ĉekon je la nomo de « Armor Esperanto »

Pour plus d'information / Pliaj informoj :
Franjo LEVEQUE - 3, rue Voltaire -
22000 - ST BRIEUC. Tel. : 09 53 92 77 37.
leveque.franjo@gmail.com

Nia amiko Bernard DUFRESNE el la Havra regiono informas nin ke la reta-adreso de la gvidilo **"Turismo kaj Esperanto"** ŝanĝiĝis. Ĝi nun estas : **http://www.gvidilo.net**

Ĉe tiu adreso vi trovos tre interesajn informfoliojn pri turismo. Ili estis tradukitaj de « Groupe Espérantiste Havrais » :

**htpp://www.esperanto-lehavre.org**